

FRANCA

PRIEURE SAINT-MARTIN
77610 LA HOUSSAYE EN BRIE
FRANCE

KATOLIKA ESPERANTISTO

★ Organo de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO-ASOCIO, filio de I. K. U. E. ★
(Association Catholique Française pour l'Espéranto)

Prezidanto: S-ro A. BESSIERE 28, rue C. Saint-Saëns 76000 ROUEN
Sekr: F-ino G. PREUX 55/3 Rés. Terrasse R. du 11 novembre 59290 WASQUEHAL
Kasistino: S-ino J. VINCENT 26 bis, rue MILNGAVIE 49150 BAUGE
Religia konsilanto: P-ro L. BOURDON 7, av. Salomon 59000 LILLE
Peranto I.K.U.E: P-ro R. DEGRELLE 12, r. Estienne d'Orves 54490 PIENNES

Ŭ.C.P: Association Catholique Française pour l' Esperanto 2324 93 N ROUEN

==== la m^o: 8 F. Abono: 30 F (TTC). Kotizo: 10 F. Sumo: 40 F. ====

==== N^o 168 ==== BULLETIN TRIMESTRIEL ==== TRIMONATA BULTENO ====
*** Sankta PIO X-a, preĝu por ni. ***

==== MARTO 1991 ====

N.B. La materialo por la bulteno oni sendu al S-ino Vincent nepre antaŭ
la 5-a de februaro, majo, aŭgusto kaj novembro.

LE MOT DU PRESIDENT

Pâques, fête de la Résurrection, que nous célébrerons bientôt, nous rappelle que, dans le Christ, nous avons reçu un esprit d' enfants de Dieu.

C' est ce thème qu' approfondiront, en août prochain, les jeunes catholiques du monde entier, lorsqu' ils se réuniront auprès de la Vierge de Czestochowa en Pologne. Ainsi, entre eux, des échanges s' établiront dans la chaude amitié que partagent volontiers les jeunes. Ceux qui pratiquent la Langue Internationale Esperanto communiqueront facilement et tireront donc un plus grand profit de leur pèlerinage, puisque, plus que les autres, ils se sentiront unis par une langue commune, source d' amour fraternel et de liberté d' expression.

A. B.

LA BILETO DE LA PREZIDANTO

Pasko, festo de la Releviĝo, kiun ni baldaŭ celebros, memorigas al ni, ke em Kristo, ni ricevis spiriton de Di-idoj.

Tium temon primeditos, en la venonta aŭgusto, la junaj katolikoj el la tuta mondo, kiam ili kunvenos apud la Virgino de Czestochowa. Tiel, inter ili, ekestos interŝanĝoj en la varma amikeco, kiun volonte dividas la junularo. La praktikantoj de la Lingvo Internacia Esperanto facile komunikos kaj sekve eliros pli grandan profiton el sia pilgrimo, ĉar, pli ol la aliaj, ili sentos sin unuigitaj per komuna lingvo, fonto de frata amo kaj de libera esprimado.

Plej koram dankon al tiuj, kiuj sendis bondezirojn al la redakcio.

KRISTANA SINTENO DUM LA LASTA MONDMILITO

Em la alta valo Stura (itala), taĉmento de alpmilitistoj venanta el pas-
ejo de alta altitudo, celis la konkero de altaĵo superrigardanta valon kovritan
de lagetoj. La taĉmento, protektita de densa nebulo, iris sen malfacilaĵo ĝis
lageto, kie ĝi poziciis por ataki. Sed la nebulo maldensiĝis kaj la italoj staris
sub la premo de la aŭtomataj armiloj de la francoj, kiuj superrigardis la valon.
La alpmilitistoj pafis, tuj efike kontraŭbatalitaj de la francoj. La situacio
aspektis netolerebla kaj iĝus amasbuĉado, se blanka flago ne flirtus, kvazaŭ per
sorĉo, ĉe la francaj kontraŭuloj. La pafado ĉesis kaj grupo alproksimiĝis al la
lageto. Estis kuracisto, oficino kaj kelkaj "poilus" kum dikaj lipharoj. La ofi-
cero deklaris: "Vi me povas fuĝi kaj ni povus mortigi vin fulme. Ni vidis, ke vi
povus esti niaj filoj kaj ni kompatas vin kaj viajn gepatrojn. Forlasu la armil-
ojn kaj foriru. Neniu pafos vin. Ni kuracos la vunditojn."

Post tio, la italoj fordonis kelkajn me plu uzeblajn pafilojn kaj ĉio
pace finiĝis.

(El la itala revuo Cuneo, provinca granda, aprilo 1990, p. 30-31.
Trad. A.B.)

+++++

INTERNACIA VIENA RADIO

Ĉiudimanĉe, Internacia Viena Radio dissendas Esp^o programon de 13.05
ĝis 13.30, universala tempo (14.05-14.30 laŭ la franca horo) sur la frekvencoj
6155 Khz, 13730 Khz kaj 21490 Khz.

La programo estas varia kaj interesa. Ofte ĝi rilatas al la lando Aŭstr-
ujo. Em leterkesto, la stacio respondas al la leteroj de aŭskultantoj. Se vi mem
skribos (DRF, Esp^o fako, A-1136 WIEN Aŭstrujo), vi ricevos esperantaĵojn kaj sam-
tempe kuraĝigos la prelegantojn.

Kutime la ricevado, ĉefe laŭ la frekvenco 13730 Khz, estas bona.

+++++

LA ATA-ITA PROBLEMO

La ĝusta uzo de ata aŭ ita estas problemo pli facila ol oni ofte supozas.

1. Oni uzas ATA en la jenaj okazoj:

a) ĉe verboj de daŭro sen rezulto: Mia nomo estas konata ĉe kortego
Si amis kaj estis amata.

b) ĉe verboj de daŭro, kum aŭ sen rezulto, kiam oni akcentas la dis-
volviĝadon de la ago: Ĉi tie la infanoj ludadis, dum en la sinagogo estis legata
la semajna parto.

Mi opinias, ke la domo estos konstruata pli ol tri jarojn.

c) ĉe verboj de daŭro aŭ sen daŭro, kiam temas pri ripetado:

Ŝi me sciis, ke kio estas permesata al Jupitero me estas permesata
al bovo (proverba diro plurfoje aplikebla)

Tiaj oficoj estas bone pagataj (ĝenerale)

Dio estu laŭdata.

2. Oni uzas ITA en ĉiuj aliaj okazoj:

a) ĉe verboj de rezulto sen daŭro, kiam me temas pri ripetado:

Tiu propono estis akceptita.

Ĉu vi volas esti forpelita?

b) ĉe verboj de rezulto, kum aŭ sen daŭro, kiam oni esprimas la re-
zulton de fimita ago. Sed oni devas distingi:

- ĉe la tempoj prezencaj (estas-ita) aŭ futuraj (estos-ita), la
participo ITA montras, ke la ago, kiun la participo esprimas, estas antaŭtempa
al la tempo, kiun montras la helpverbo:

La verko me estas tradukita el la originalo (oni me tradukis)

Ĉiuj artikoloj estas skribitaj de mi (mi skribis)

Se vi estos venkita, oni diros... (oni diros post la venko)

- ĉe la preterita tempo (estis-ita), la afero estas alia. Fakte,

se oni diras: La ŝlosilo estis perdita, kiam vi lin vizitis, oni me scias, ĉu
tiu perdo estis antaŭa aŭ cuma rilate al la vizito. Do oni devas precizigi per
adverbo "jam" (se la ago estas momenta) aŭ "antaŭe" (se ĝi estas daŭra) aŭ "tiam"
(se samtempeco):

MUZEO EN PALACO NAPOLEONO LA III-a.

Dank' al la financado fare de la urbo Amiens, helpe de la Ministerio pri Kulturo kaj Komunikado kaj de la Generala Konsilantaro, la pikarda muzeo, unu el la plej gravaj francaj provincaj muzeoj, estas komplete renovigata.

Konstruita inter 1855 kaj 1867 laŭ iniciato de la Pikarda Societo de l' Antikvaĵistoj, la pikarda muzeo (tiam muzeo Napoleono), celis akcepti la regionajn antikvaĵojn kaj restaĵojn, kiel modelo de la nova Luvro de Napoleono kaj kiel monumento al Pikardio. El la palaco, ĝi konservis la monumentajn fasadojn kaj la dekoron eksteran kaj internan. Al Puvis de Chavannes (1824-1898), oni ŝuldas la grandiozajn pentraĵojn, kiuj ornamas la honorŝtuparon kaj la galeriojn de la umua etaĝo. Ili konsistas el 14 verkoj el kiuj ses grandaj: Concordia kaj Bellum (1861) Laboro kaj Ripozo (1863), Ave Picardia Nutrix (1865) kaj Pro Patria Ludus (1862). La tutan verkaron oni komplete restaŭris en 1987.

La kolektoj dividiĝas en tri grandajn grupojn:

- 1) arkeologio, kun egiptaj, grekaj kaj lokaj kolektoj (prahistorio, bronza periodo, preromiana, gaŭlo-romiana kaj merovea periodoj);
- 2) mezepoko de la IX-a ĝis la XVI-a jc.;
- 3) pentr-kaj skulpt-arto de la XIV-a ĝis la XX-a jc.: El Greco, Ribera, F. Hals, Quentin de la Tour, Chardin, Fragonard, Boucher, Lancret, flandraj pentraĵoj de la XVII-a jc?, Barbizon-a skolo de la XIX-a jc.

De 1983 oni konstruas arkeologiajn salonojn subtere, kio triobligas la daŭran prezenteblecon de la kolektoj, daŭre pliriĉiĝantaj dank' al la aktiveco de la Societo de l' Antikvaĵistoj.

Ne preterlasu tiun interesan viziton!

El artikolo aperinta en la MGEN-bulteno n° 133, jan. 1991.

XX

LA I.K.U.E-MEMBRARO 1991

- 1. S-ro THIOLLIERE; 2. S-ro SAUTREUIL; 3. S-ro CUGNY; 4. F-ino MARTIN; 5. F-ino CHATELUS; 6. S-ro MARTIGNON; 7. S-ino CHEVERRY; 8. S-ro ROYER; 9. S-ro AMOUROUX; 10. S-ro DESPINEY; 11. S-ro MILLET; 12. F-ino VANNEAU; 13. S-ro GOURDON; 14. S-ro BESSIERE; 15. S-ro PERDRAUD; 16. S-ro LECOCQ; 17. S-ro COLAS; 18. S-ro PETIT; 19. S-ro L. VERNIN; 20. S-ro P. VERNIN; 21. F-ino GIUDICELLI; 22. G-roj SANSON; 23. S-ro FARDET; 24. S-ro BERNARD; 25. G-roj SEGUIN; 26. S-ro JOSSINET; 27. P-ro GOUDE; 28. F-ino GOUDE; 29. B-ro HEROUX; 30. S-ino GILLES; 31. S-ro DOYELLE; 32. S-ro MARAIS; 33. S-ro LLORENS.

LA F.K.E.A-MEMBRARO

- BONFARANTOJ: 1) S-ino CHEVERRY (M & L); 2) S-ino GUILLOT (Oise)
- NOVA MEMBRO: P-ro RUTH (Calvados)

Dankegon al la malavaraj sinjorinoj kaj bonvenon al nia nova pastro!

XX

LITERATURA ANGULO

Antaŭ nelonge aperis "La aventuroj de Kajĉjo" de Maria Kownacka, trad. Maria Sitnik, ilustris Pol Denis, eldonis la grupo de Meuse-Bar-le-Duc. La libro rakontas, kion faras impertinenta kaj helpema eta cikonio. Ĝi havas 85 paĝojn kaj kostas 70 F. Mendebila ĉe F.X. GILBERT Vert Coteau 55000 Longeville-en-Barrois. Pagoj ĉu al la p.ĉ.k. groupe des espérantistes meusiens 27 32 V Nancy, ĉu per ĉeko je la nomo de F.X. Gilbert.

XX

KASISTINA ANGULO

Krom se mi eraris, ŝajnas al mi; ke la jenaj anoj nenion sendis al la kaso por 1991: O.A(57); L.B(37); S.B(46); L.B(62); H.D(75); J.D(05); V.G(09); M.G(88); M.G(37); J.G(42); G.G(54); M.G(94); R.H(49); M.T.L(73); B.L(94); E.L(49); A.M(42) P.M(44); R.M(67); S.M(41); J.M(77); P.M(18); R.P(09); P.P(76); C.R(47); E.R(44); J.R(27); P.R(92); G.S(32); P.S(60); A.S(66); L.T(75); G.V(59); S-roV(59); G.V(61) G.V(91).

Se intertempe vi pagis vian kotizon, tiu alvoko me plu koncernas vin. Dankon.

FINANCA RAPORTO POR LA JARO 1990

ENSPEZOJ	!	ELSPEZOJ
Kotizoj	4 130,00	! Bulteno 3 767,62
Donacoj	2 116,50	! Korespondado 575,70
Rentumo ŝparkaso	439,00	! Vojaĝoj komitatanoj 2 874,00
Kongreso Bouresse	600,00	! Sidejo U.F.E. 200,00
	<u>7 285,50</u>	! Abatejo Kergonan 260,00
		! Diversaj 206,70
		! 7 884,02
Em la kaso la 1/1/1990	14 098,03	! Em la ŝparkaso 10 197,39
Negativa saldo	598,52	! Em la p.ĉ.k. 3 302,12
	<u>13 499,51</u>	<u>13 499,51</u>

RENOVIGO DE 1/3 DE LA KOMITATO

Instrukcioj por la voĉdonado: respondu la ĉi-subajn demandojn 1 kaj 2. Emmetu la voĉdonilon (eventuale ankaŭ la rajtigilon) en koverton sen indiko. Enŝovu ĉi-tium koverton en alian, kiu vi sendu al la sekretario, F-ino Preux, antaŭ la 15-a de aprilo. Dorso de tiu dua koverto, skribu vian nomon. Ne sendu ion plian; ĉar tium koverton oni malfermos nur en Amiens, dum la kongreso!

RAJTIGILO

Mi, subskribinto (nomo kaj voknomo) me povas partopreni la kongreson en Amiens kaj rajtigas reprezenti min kaj preni mianome ĉiujn decidojn por la bono de F.K.E.A. Antaŭ la subskribo, skribu Dato kaj subskribo mane "Bon pour pouvoir"

VOĈDONILO

1. Ĉu vi aprobas la laboron faritan de F.K.E.A.? JES NE SINDETENO (1)
2. Ĉu vi aprobas la financon raporton? JES NE SINDETENO (1)

Renovigo de 1/3 de la komitato. Estas 4 kandidatoj por 4 postenoj. Vi rajtas forstrekii nomo(j)n aŭ aldoni, sed devas esti maksimume 4 nomoj entute.

S-roj BESSIERE Albert P-ro BOURDON Louis
COLAS René-Claude S-ro DESPINEY Roger

(1) Forstrekii la senutilaĵojn.

N.B. Ĉu vi atente legis la instrukciojn por la voĉdonado?

Nur tiuj, kiuj pagis sian kotizon por 1991 rajtas voĉdoni.

TUJ reguligu vian konton; morgaŭ vi jam forgesos!

AL LA KONGRESONTOJ

Kiel vi legis en la kongresa programo, en Amiens okazos ekzamenseso. La kandidatoj bonvolu sin anonci antaŭ la 15-a de aprilo al S-ino Vincent, indikante, kium ekzamenon ili deziras provi: A. pri Lernado, pri Praktika Lernado, pri Kapableco. Atentu! Necesas havi la AL por provi APL, kaj havi APL por provi AK!

ENHAVO

- | | |
|---|---------------------------------------|
| 1. Le mot du président | 4. Muzeo en palaco Napoleono la III-a |
| 2. Kristana sinteno dum la lasta mondmilito | La IKUE- kaj FKEA-membraroj |
| Internacia Viena Radio | Literatura angulo |
| La ATIA-ITA problemo | Kasistima angulo |
| 3. Grava komuniko de I.K.U.E. | 5. Financa raporto 1990 |
| Protokolo de la januara komitatkunveno | Rajtigilo kaj voĉdonilo |

KOTIZTABELO 1991

I.K.U.E. kun "Espero Katolika"	140 F
Peranto: P-ro R. DEGRELLE c.c.p. NANCY 2 555 38 L.	

A.C.F.E. kun "Franca Katolika Esperantisto" - unuopulo	40 F
geedza paro	50 F
infano ĝis 16-jara, pastro, religiulo(in)o	20 F
bonfaranto	200 F

U.F.E. kun "Revue Française" kaj "E° Actualités"	235 F
U.E.A. kun "Esperanto" kaj Jarlibro	225 F
Association Catholique Française pour l' Esperanto c.c.p. ROUEN 2 324 93 N.	

Dépôt légal: 1er trimestre 1991 !! Polycopié pour l' A.C.F.E. (enregistrée le !! 6 mai 1977 à la sous-préfecture de Saumur C.P.P.A.P. n° 62 532. !! sous le n° 2523 bis - J.O. 23 mai 1977) Directeur: Albert BESSIERE !! par le prieuré St-Martin Directeur-délégué: !! 77610 LA HOUSSAYE EN BRIE René-Jean MARMOU !! FRANCE